# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

mardon, la 10an de Julio, 2018 • numero ok

## Hodiaŭ

- ★ **7:15 atm:** Matenmanĝo
- ★ **8:30 – 12:00 ptm:** Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)
- ★ **8:30 – 12:00 ptm: KER-ekzamenoj: skriba parto**
- ★ **12:15 ptm:** Tagmanĝo
- ★ Posttagmeze: KER-ekazamenoj (parola parto, individue)
- ★ **2:00 – 5:00 ptm:** Lecionoj (Vergara)
- ★ **3:00 – 5:30 ptm:** Brajeno gvidos **ekskurson al Raleigh**. La promeno al la urbocentro postulos pli-malpli 15 minutojn. Brajeno montros la lokojn de la ŝtatdomo de Norda Karolino kaj du muzeoj: historia kaj naturscienca. Ekskursantoj estos liberaj por elekti tiu(j)n, kiu(j)n ili volas viziti. Bonvolu amasiĝi en la malgranda parkejo ekster *Finley Hall*. La grupo ekpromenos ĝustatempe.
- ★ **5:30 ptm:** Vespermanĝo
- ★ **6:15 – 6:55 ptm:** Gregoro CEJTIN gvidos diskuton pri **"Kial Esperanto estas bona lingvo"** *Flowe* (en la klasĉambro de Anna)
- ★ **7:00 - 8:30 Distra vespero:** NASKanoj distros nin per muziko, dancado, deklamado, kaj kiu-sciaskion
  Teatro, ĉefa konstruaĵo (*Main*)
- ★ **9:00:** Gufujo

## Morgaŭ

- ★ **Manĝoj** je la kutimaj horoj
- ★ **Lecionoj** je la kutimaj horoj
- ★ **6:15 - 6:55 ptm:** Hoss FIROOZNIA prelegos pri **"Kial lingvosciencistoj NE interesiĝas pri Esperanto? (Kaj kiel interesi ilin?)"** *Flowe* (klasĉambro de Anna)
- ★ **7:00 – 7:45 ptm: Diplomiĝa ceremonio** *Flowe 110*

# Kelkaj antaŭforiraj anoncoj
# Some anouncements before leaving

*(English version follows)*

- **Bonvolu purigi kaj remeti ĉiujn tasojn de la kuirejo en *Finley* ĝis tagmezo en merkredo.** Ni konservos la kolekton por la NASKanoj de 2019. Se vi ne remetos la tasojn, estos malpli por la venontjara grupo. Ne lasu tason en via ĉambro – la universitato forigos ĝin.

- Metu la tukojn ekster vian pordon. **Donu vian enirkarton kaj ŝlosilon al Ellen en ĉambro 107 aŭ enmetu ilin sub ŝian pordon.**

- **Please wash and return the cups from the kitchen in Finley by noon on Wednesday.** We'll keep this collection for NASK participants in 2019. If you don't return the cups, there will be fewer for next year's group. Don't leave a cup in your room – the university will get rid of it.

- Place your sheets, blanket and towels outside your door. **Give your entrance card and key to Ellen in room 107 or put them under her door.**

# Kial lingvosciencistoj NE interesiĝas pri Esperanto? (Kaj kiel interesi ilin?)

*jen priskribo de la prelego, kiun Hoss FIROOZNIA prezentos morgaŭ*
*(English summary follows)*

Jes, lingvosciencistoj interesiĝas pri lingvoj … sed ne ĝuste tiel, kiel oni ofte supozas. Kial ili kutime ne interesiĝas pri Esperanto? Hoĉjo proponos kelkajn taktikojn por efika informado ĉe universitatoj, aparte inter lingvosciencistoj kaj ties lernantoj.

Summary: some ideas for promoting Esperanto at universities -- especially among linguists and their students. The talk is in Esperanto, but beginners are welcome, as are questions in English!

# Allogismo

*de Rando ĤRON*

Dum legado de la respondo de Simono pri la prelego de José Antonio Vergara, alvenis ideo: ALLOGISMO. Jen kelkaj ecoj:

- Ne eĉplupligrandegigu viajn vortojn.
- Ne vortarigu la akademianojn.
- Ne malalkutimiĝu al la akuzativo.
- Gramatikemuloj, ne timigu la komencantojn.
- Ne malbonlingvigu la novlernulojn.
- Ne forgesu vian kontraŭodorsistemon.

Fakte, la lastan mi mem forgesis kiam mi venis al NASK, do mi esperas ke vi pardonos min.

# "Se vi konstruos ĝin, oni alvenos"

*de Tiffany ANTOLPOLSKI*

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi unue pripensis eklerni Esperanton, mi diskutis pri tio kun mia patro. Li ne vere ŝatis la ideon. Li diris al mi, "Vi malŝparos vian tempon! Neniu parolas tiun lingvon nun. Trovu ion ajn por fari. Eble lernu la francan." Li kompreneble diris tion al mi en la angla.

Do mi esploris en la reto, kaj mi trovis la Esperanto-Rondon de Toronto (kiu nun nomiĝas Esperanto-Toronto. La nomo estas la sama en ambaŭ lingvoj nun ☺). Ajnokaze, mi poste trovis multajn grupojn... en Varsovio, en Pariso, en Berlino ktp. Do, mi diris al mia patro "Vidu, estas grupoj ĉie! Mi povas vojaĝi kaj uzi tiun lingvon en ĉiuj landoj!"

Do mi eklernis Esperanton. Tio estis antaŭ longa tempo. Nun, antaŭ kelkaj semajnoj mi diris al mia patro, ke mi pripensas lerni la hebrean. Li demandis, "Kial vi volus lerni tiun lingvon?" Tiam li diris, "Vi povus uzi ĝin nur en unu lando! Restu ĉe Esperanto!"

Mi pensas, ke mi atingis mian propran finan venkon.

# Laŭtlegu tiun ĉi tekston

Raúl GARCIA petas, ke vi alkutimiĝu al la jena teksto (aŭ eĉ parkerigi ĝin). Li volas registri homojn por projekto. (*Mi ne scias, pri kio temas - Redaktoro)*

Anna estis amata de ĉiuj. Oni skribis pri ŝi en ĵurnaloj, kaj oni eĉ kantis pri ŝi en ĥoro. Hodiaŭ ne zorgu, nek sentu vin malbona. Restu certa, ke ni revos pri ŝi.
"Kaj tiel plu, kaj tiel plu."

# Ŝerca frazo

*de Marcus GRIEP*

La pola patro poste portos per poŝo po naŭ pomojn al porkoj por plurfoje plipomigi la pendontajn porkojn.




*La lernantoj (kaj instruisto) de la klaso por komencantoj de 2018. Foto de David NOAH.*

# Lastaj vortoj de la redaktoro

Estis mia plezuro renkonti vin ĉiujn kaj redakti la *Faskon* ĉi-jare. Dankon pro viaj kontribuoj. NASK 2018 estis bonega sperto, kaj mi esperas vidi multajn el vi venontjare dum la 50a NASK!

*-Brajeno*

# Tiu ĉi estas la lasta numero de *La NASKa Fasko* de 2018.

# Ĝis 2019!